# Kiel du Cervidoj
## de Sylvan Zaft

La stratojn de la Sanka Ter′ plenigas
buŝsonoj kiajn la antikvaj buŝoj
elĵetis. La soldat′ de l′ Reĝ′ ŝafista
ellangis samajn vortojn: pac′, milito,
kiujn Uzo-portantoj ĉi tie diras.
Vendantoj nun ofertas samajn sonojn
pri multaj varoj kiujn prononcis tiaj
en la jarcentoj de la Saĝa Reĝ′.
Tajpiĝas amletero komputile
per la literoj samaj kiajn tiam
skribis la reĝ′ por laŭdi ies mamojn.